

OFICIALA ORGANO DE PROLET-ESPERANTISTA UNIO DE IBER-AMERIKAJ LANDOJ

II-a Epoko 1-a (4) JARO	REDAKTEJO - ADMINISTREJO Cros, 4 - Barcelono (Sans)	BULTENO DECEMBRO 1935	SOCIA SIDEJO Cros, 4 - Barcelono (Sans)	Nr-o 2 (31)

PRI LA II-a KONGRESO DE P.U.I.L.

Kial okazigi ĝin dum vintro?

Certe multaj faris al si ĉi tiun demandon, surprizitaj antaŭ la ĉiama kutimo kongresi dum somero.

Unue mi diros, ke PUIL ankoraŭ ne estas tiom potenca organizo por utiligi kongreson por la pompa propagando de esp-o k de la Unio.

Tiun stadion, ni ripetas, ankoraŭ ni ne atingis, kvankam ni havas la esperon ĝisiri al ĝi . Tial ni ne povas organizi la kongreson kiel spektaklon ĉar mankas al PUIL finanza materialo.

Kompreneble, PUIL havas sekuritan vivon, sed ne por tiaj luksaĵoj, ĉar ĝia kreskado estas malrapida k plena je obstakloj. Eĉ ni diros pli: la Oktobra Revolucio gravege minacis la vivon de PUIL, k ĉi tiu eĉ malkreskis, ĉar la persekutado estis longa k senpia. Pro la cirkonstancoj multaj ne repagis la kotizon al PUIL. Ankaŭ mankis la agitilot, t. e. "Proleta Voĉo" por instigi al laboro. La grupoj ofte estis fermitaj, la kamaradoj devis kaŝi sin, multaj kuŝas en karcero, kelkaj por dumviva puno, aliaj forkuris fremden, eksterlanden. Kaj ne mankas tiuj, kiuj pro timo retiriĝis al la hejmo. Ankaŭ konsiderinda nombro perdis la laboron. Ĉio ĉi do, duondetruis PUIL-on. Ni reenleĝiĝis por regrupigi nin, por daŭrigi la vivon de PUIL, por aperigi PROLETAn VOĈOn, por repuŝi antaŭen la proletan esperantan movadon en Hispanio. K ni ne povas atendi okazigi la IIan Kongreson en somero, kiam la esperantista vivo estas preskaŭ senviva ĉie. Dume, nun,la grupoj laboras, ĉie oni faras kursojn de esp-o, unuvorte, esp-o vivas pli dum vintro ol dum somero.

K cititaj malhelpoj ne estas ankoraŭ eble la plej kortuŝaj por laboristaj militantoj. Tuj post la naskiĝo de PUIL, pro ĝia sola faro naskiĝi, ĝi sin sentis premata de malamikoj, ne nur tiuj, burĝpensaj, sed eĉ inter la ŝajnaj amikoj mem, bedaŭrinde.

Sed malgraŭ la nombro da malamikoj kiuj havas PUIL, ĉie, malgraŭ la persekutoj kiujn suferas obstine proletaro, ĉi tiu neniel povas esti venkita k sekve nek PUIL. Ja, la radikoj de PUIL estas multaj k profundaj, k la ventegoj ne facile terenĵetos ĝin. K malgraŭ ĉio ni sentas en nia koro, ke ni estas pli fortaj nun ol iam ajn. PUIL havas rolon k ĉi tiun ĝi devas plenumi. PUIL okupas kulturan lokon en la vicoj de la laborista klasbatalo k ĝis la plena venko sur nia komuna malamiko ni ne ĉesos la batalon; ĝis tiam ni ne cedos la lokon kiun ni okupas en tiuj vicoj al la novaj generacioj, al niaj filoj.

Due, ĉar ni devas organizi la Kongreson ne kiam ni volas, sed kiam cirkonstancoj postulas k permesas ĝin okazigi. La ĉefaj nukleoj de PUIL nun estas en Katalunio, ankaŭ

Trie, la Kongreso dum vintro permesos revivigi PUIL-on, post pli unujara paralizo k perforta silento. La gvidaj komitatoj de PUIL estas detruitaj de antaŭlonge; nur restas ene de ili malmultaj konsistantoj. Urĝas ordigi kiel eble plej baldaŭ la vivon de PUIL, elekti novajn komitatojn, helpi la grupojn k religi ilin. Necesas restarigi la esperantistan proletan movadon k aperigi ĉiumonate PROLETAn VOĈOn; necesas krei novajn grupojn k prosperigi pli ol ĝis nun la

esperantismon laboristan. Sed por efektivigi ĉi tion ni devas tuj ripari la aparaton, kiu ligas al ĉiuj ni. Ni devas reordigi la vivon de PUIL, de la supro ĝis la bazo k de la bazo ĝis la supro.

Kavre, la Konbreso, pro la agitado kiun ĝi kaŭzas aktivigas la vivon de la grupoj k la membroj nepagintaj pasintjare repagos sian kotizon. Samtempe, la junularo ne esperantista farigîs pro la oktobraj okazintaĵoj revo luciema altgrade k multaj deziras lerni esperanton k aliĝi al proletecaj organizoj.

PUIL bezonas aktivigi la pagon de la kotizoj por 1936 por komenci kampanion k malfermi kursojn de esperanto ĉie, kie eblas k agiti por la kresko de proleta esperanta movado.

Protiuj kaŭzoj estas neniel konsilinde atendi la okazigon de kongreso en somero, ĉar ni devas profiti la nunan oportunon, kiam floretas la esperantista vivo en vintro.

Kamaradoj: se ni atendas pli, la Unio multe suferos, k ĉiu kiu amas ĝin kiel ni, ne povas nei sian kunhelpon k aplaŭdos ne nian moloportunon, sed kontraŭe, ĝian oportunecon.

For rutinon, kiam ĝi malhelpas!

Ekzekutiva Komitato

PUIL k la Internacioj esperantistaj

Kelkaj kamaradoj ŝajne riproĉas al la Unio, ĉar ci tiu *ankoraŭ* ne aliĝis al aina Internacio. Per ĉi tiu artikolo mi volas fari kelkajn konsiderojn per kiuj la riproĉantoj povos havi kriterion tre konvenan. Ja oni akuzas nin kvazaŭ ni estus malamikoj de proletaro, nur pro tio ke la Unio restas ekster la Internacioj.

Ni devas deklari ke la unuan paŝon ni jam faris, sen kiu estas vane paroli pri la nuna sistemo de Internacioj. Tiu paŝo estas la kreo de la Unio. Ni opinias ke ĉi tiu estas la deirpunkto de laborista movado. Sed malgraŭ ĉi opinio, diversaj prolet-esperantistaj nukleoj de la lando-ĉar estas ĉi tiuj la kritikantoj-ne enskribiĝas en PUIL, sendube atendante la decidon de la Unio aliĝi al la preferata Internacio de ties grupoj.

La unua devo de tiuj kritikantoj estas aniĝi al PUIL k plifortigi ĝin. Resti for el la vicoj de organizitaj vicoj de laboristaro en Hispanio, estas grava eraro, ĉar el ekstero nenion oni povas fari, nek por la preferata Internacio, nek por PUIL.

Ni opinias ke dume la ĉefaj esperanto-proletaj rondoj de la tuta lando restos for el PUIL-vicoj, ni ne povas nek devas fari tiaspecan decidon, kiun devas proponi kongreso, k se ĝi estas aprobata, prezenti al ĉiuj anoj de PUIL la proponon por ke ili studu ĝin k voĉdonu por aŭ kontraŭ. La plimulto decidos. Sed devas esti plimulo tuthispania.

Nun kunlaboras en PUIL, anoj el diversaj Internacioj esperantistaj klasbatalaj; k multaj aliaj membroj apartenas al neniu Internacio. Ĉu ni estas tiel nesingardemaj, dependigi la Union de iu Internasio k pereigi tiel PUIL? Ne. La internacia afero amputus al PUIL sektorojn laboristaj kiuj nun vivigas ĝin, k kiuj estas absolute necesaj. La Internacioj, kreitaj unue por kunigi, hodiaŭ iafoje praktike havas inversan rolon; ili estas severaj obstakloj por la kunagado.

Ni ne povas vivi el promesoj. PUIL por plenumi la dezirojn de eksteraj kamaradoj unue bezonas, ke ili ariĝu kun ni, k ĉiuj kune decidos pri ĉi interesa afero. Dume ili ne venos al ni, ni ne povas dividi nin sub la espero de promesoj sen agoj. ¿Ĉu ili deziras la pereon de PUIL? Kredeble ne. La Unio havas la brakojn maltermatajn por ĉiuj klasbatalemej esp-laboristoj. La kotizo estas sufiĉe malalta -4 ptoj. ĉiujare.

Ni prezentas absolute nenian obstaklon al tiu, kiu deziras k kredas kiel ni, ke la laborista esperanto-movado de Hispanio devas vivi en intima kunligiteco, se ĝi volas kreski k plenumi ĝian denaskan rolon.

Ni opozu nenian kulturklasan movadon al tiu de burĝaro, k ĉesu tuj nia senpoveco per nia *memkonscio* pri bezono k eĉ neceso kunagi akorde k inteligente ĉiuj, kiuj pensas simile k havas identan celon! ¿Kiuj speciale deziras k apogas la disigojn en momentoj en kiuj la malunuigo aŭ divido pereigas al ĉiuj? Certe ne estas la kamaradoj k la laboristaro, kiuj havas internan intereson pri propa fiasko klasa. ¡Ĉiam ni trviĝu je la nivelo de cirkonstancoj k neniel sub ĉi tiuj! ¿Ĉu vi konsentas aŭ kunsentas, k-do?

Protono.

Gek-doj! aĉetu

GRAMATIKON

Eldonitan de PUIL por fari elementalajn kursojn en niaj vicoj

Prezo po ekzemplero: 1 pto.

AL UNUECO

Pripensu multe ĉiuj k-doj pri la enhavo de ĉi tiu artikolo.
Redakcio

Ciujare dum augusto, Esperanto elmontras sian vivon per internaciaj kongresoj, kaj al ĉiu pripensanto aperas klare la karakterizoj de l'Esperanto-movado jen neŭtrala, jen laborista, meze de la vasta socia movado. Denove ĉiu klarevida esperantisto povis konstati, ke la Esperanto-movado sekvas fidele la fluktuojn (variojn) de la socia movado. La t. n. "neŭtrala" movado esperantista ree forlasis sian neŭtralecon kaj enpenetriĝis pli profunden en adaptiĝon al faŝismo. Kontraŭe la laboristaj esperantistoj, ankoraŭ dividitaj laŭ tendencoj, sentis profunde la neceson reunuiĝi por sukcese batali kontraŭ milito kaj faŝismo kaj faris la unuajn paŝojn al unueco.

Anstataŭ kongresi por esprimi forte la porpacan idealon de Zamenhof en la momento, kiam la barbara itala faŝismo estis ekmurdonta paceman abisenan popolon, la burĝaj esperantistoj agrable promenadis tra Italio, ignorante la militdanĝeron, ĝoje banante sin en militatmosfero. Ili karavanis ĝis faŝista Afriko kaj nun povas atesti, ke la faŝistaj registaroz alportas ĉien civilizon, progresadon. Ili faris turisman vojaĝon reklaman por faŝismo.

La laboristaj esperantistoj kongresis en Parizo (SAT-anoj) kaj en Antverpeno (IPE-anoj). 3-membra delegitaro de SAT-kongreso partoprenis la IPE-kongreson kaj akceptis kunlaboran rezolucion. Tiuj, kiuj plenkomprenas la gravecon de la nuna epoko kaj la nepran neceson de unueco de ĉiuj laboristaj fortoj, ĝojos pri tiu kontakto. Kelkaj erare asertas, ke la sendon de tri SAT-delegitoj al IPE-kongreso trudis manovro de iu SAT-opozicio celanta novan skismon. Ni opinias kontraŭe, ke ĝi estas la rezulto de la alvoko de IPE-anoj kaj de la respondo de SAT-anoj sincere unuecemaj. Ni bedaŭras, ke ISE ankoraŭ ne respondis al unuecemaj proponoj, sed ni esperas, kaj ni ankaŭ penos, ke oni trovos formulon por ke ĉiuj tutmondaj organizaĵoj (IPE, SAT, ISE, TLES, IFEPE...) kaj ĉiuj naciaj asocioj laboristaj, kaj ankaŭ ĉiuj proletaj esperantistoj-unuopuloj povu amike kunlabori.

Per speciala letero de 11.7.35, IPE-oficejo invitis nian IFEPE al Antverpen'a kongreso por studi la problemojn de l'unueca fronto kaj organiza unueco kune kun ĉiuj mondaj kaj landaj esperantistaj organizaĵoj. Ni sendis delegiton, K-don rumanan Berlo. Li memorigis, ke nia IFEPE ekde sia fondiĝo laboras sur unueca bazo kaj ke en ĝi kunlaboras edukistoj el IPE, el SAT, el ISE kaj ankaŭ progresemaj edukistoj el UEA. Dum en Italio, Germanio, Aŭstrio, Hispanio, Francio... la laboristoj volas silentigi siajn tendencajn diferencojn kaj unufrontiĝas kontraŭ faŝismo kaj milito, la esperantistaj laboristoj ne estus tiel malsaĝaj, ke ili atendus la finon de faŝismo por sin reunuigi.

K-do Berlo montris, kiel IFEPE unuecfronte laboras per Esperanto kontraŭ faŝismo kaj milito. Torĉo ne estas teoria diskutilo, sed en ĝi la edukistoj—laboruloj raportas faktojn el sia vivo. Estas ne vere, ke porgazetara servo kaj kolektiva korespondado povas esti nur frakcia laboro. Ne, ili estas la plejbona solvo de la problemo pri utiligo de Esperanto por laboristaro. Nun kiam regas faŝismo kaj milito en plejparto de la mondo, frakcia laboro, eĉ peresperanta, povas havi signifon nur tre malgrandan. For tiun emon tendencigi la plejgravan Esperanto-laboron la kolektivan aplikon de la lingvo por liberigi laboristaron!

En tutmondo estas proksimume 25.000 organizitaj laboristaj esperantistoj. La unueco de la Esperanto—proletaro estos kompleta nur, kiam ĉiuj 25.000 Esperanto—proletoj estos kunigitaj en la sama ununura organizaĵo. Tion atingi oni povas, certe ne tuje, sed post tre malmulta tempo de kunlaborado ĉefe sur aplika bazo de porgazetara informado kaj kolektiva korespondado. Nia delegito ĉe IPE-kongreso esprimis la opinion de la plejmultaj IFEPE-anoj pri tiu demando per jenaj konkretaj proponoj:

1. Nur kunlabora unuecfronto povas prepari laŭprincipan organizon unuecon.— 2. Bazo ideologia kaj struktura de la sola tutmonda organizaĵo starigenda estu la laborista internaciismo. Tiu organizaĵo estos kultura fako en la ununura sindikata internacio. Tiel ĝi havos internaciisman strukturon, do konsistos el naciaj sekcioj. Sekve SAT-anoj rezignus sian sennaciecan strukturon, kiu forigas prirespondecon, kontrolon kaj volon de landaj sekcioj.— 3. Ĉiu tendenco povus enesti senĝene en la ununura organizaĵo. La esperantista Internacio havus la karakterizojn de ununura sindikata Internacio. Ĝi ne aliĝu doktrinon de partio aŭ partioj. Tial IPE-anoj rezignus sian statutan marksisman bazon (por ebligi aliĝon al senpartianoj kaj anarkiistoj).— 4. Kompreneble ĉiujn disputigajn demandojn pri mono, cenzuro, uzurpo, eksigoj, ktp, ktp, kiuj rilatas al pasintaĵo, oni rifuzu diskuti.

Nia delegito asertis al IPE-kongresanoj kaj SAT-delegitoj, ke IFEPE ne apartiĝos de la kreota ununura organizaĵo, sed eniros en ĝin, kiel edukista sekcio.

Ni esperegas, ke la unua kontakto en Antverpeno ebligos daŭran kunlaboron kaj naskiĝadon de nova pli vigla kaj pli vasta fervoro por-unueca en ĉiuj organizaĵoj. Jam voĉoj aŭdiĝas por plirapidigi la unuecon per starigo de vasta Internacia "laborista alianco" esperantista, konsistanta el ĉiuj mondaj kaj naciaj laboristaj organizaĵoj provizore konservantaj sian sendependecon. Salutinda estas ĉiu paŝo antaŭen sur vojo de unueco de klasbatalantoj.

Laboruloj-edukistoj penu siaflanke unuecemon. Estu daŭrigata la kontakto Antverpen'a, ĝi fariĝu pli kaj pli ampleksa kunlaborado. Ni ĉion penu por ke ankaŭ unuecfrontaj esperantistaj vicoj staru kontraŭ faŝismo kaj milito. Venonta laborjaro montru al ni novajn atingojn dum la burĝaj esperantistoj organizas novan elmontron de sia adaptiĝo al faŝismo, kongresonte en Vieno. Neniu edukisto reklamu por tiu faŝismema kongreso sed ĉiuj penu enviciĝi en reunuigenda Esperanto-proleta movado.

El «La Torĉo» Oktobro 1935.

La emo al uzado de vortaĉoj estas la dandismo ĉe laboristoj.

«Sennaciulo»

Klasa neŭtraleco

Oni kutimas miksi multfoje la sencon, ki un la vorto *neutraleco* enhavas. Laŭ klasa vidpunkto ni trastudu ciujn fenomenojn, ĉu sociajn, ĉu kulturajn, ĉu politikajn. La estonta disvolviĝo de prolet-esperanta unuiĝo bezonas ripeti la klarigojn pri neŭtrala kompreno.

Sen iu ajna djektivo la vorto *neŭleco* estas abstrakta. Ekzemple, se mi diras: Neŭtraleco proleta, tiam la afero sin presentas pli klara, komprenebla. Tial mi tuj akceptas ke plie ekzistas ankaŭ *neŭtraleco burĝa*.

Esti *neŭtrala* laŭ mastra kulturo signifas labori nek favore al proletaro, nek favare al burĝaro. Tio estas, esti jam satigita, ne partopreni en la ĉiutaga batalo, Interese la neŭtralaj homoj propagandas ke ili kontraŭstaras same proletan klason k burĝan klason. Teorie neŭtraluloj rajtas diri ĉion, kio favoras iliajn interesojn.

Tamen, ni, kiuj estas en la vicoj de prolet - esperantistaro, estas certaj pri la ecoj de iliaj diroj. Klasbatalo montras al ni konkretajn faktojn. Ĉe la nuna soci-ordo neniu rajtas, eĉ ne povas, esti neŭtrala.

Ne labori favore al proletaro, signifas esti je la servo de kapitalismo. Pere de tiuj nomataj *neŭtralaj* organizaĵoj burĝa klaso povas kapti k facile treni laboristojn, kiuj ankoraŭ ne alvenis al la konkludo, kia estas la ĝusta vojo, kiu konduku ilin labori kun aliaj klasfratoj.

Burĝa neŭtraleco malhelpas obstrukcas la proletan unuiĝon k ne akceptas klasbatalon. Resti je la servo de kapitalismo estas, laŭ ilia penso k ago, neŭtraleco. Kiel hundoj, neŭtraluloj estas fidelaj; atentigante la interesojn de siaj mastroj.

Proleta neŭtraleco akceptas klasbatalon, Ĉiu laboristo nepre devas respekti ĉiujn pensmanierojn de siaj klasfratoj. Ne militi unu kontraŭ la alian. Ni havas komunajn interesojn, klasajn vidpunktojn. Ni ne malbonigu niajn propajn fortojn.Tiele ni estos pli fortaj, fortegaj. Konsekvence, estas al ni pli facile kunigi niajn agadon por kontraŭstari k nuligi la ekspluatantojn de laborista klaso, k iliajn lakeojn, la neŭtralulojn.

F. Surinyach.

Al kuracisto, advokato profesoro, k. s. oni pagas "honorariojn"; al laboristo "salajron". Tiu simpla diferenco montras klare kiom da servuteco entenas la vorto laboristo.

«Sennaciulo»

AVIZO

Ne plu estos disdonata senpage «Proleta Voĉo»

De la komenco de proksima jaro (1936), "Proleta Voĉo" nur estos ekspedata al membroj de PUIL, al la abonantoj. Kaj al tiuj kiuj speciale petos la gazeton propagandcele, kaj kiel provnumeron. La Grupoj de PUIL kaj la instruantoj de Esperanto povos ricevi regule senpagan pakaĵon de "Proleta Voĉo" por siaj lernantoj dum la kursoj nur. Ankaŭ povos ricevi "Proletan Voĉon", kiuj intersanĝos siajn eldonaĵojn kun la niaj. Ni petas interŝanĝon al ĉiuj proletaj periodaĵoj.

Ekzekutiva Komitato

KORESPONDADO

FRANCIO

Laborista Esperantista Grupo dez. koresp. kun kolektivo de poshtisto (PEK laboro) aŭ aliaj laboristoj. Nepre respondos. Sin turni al: Henri Perreau, 3 (bis) Faubourg Bourgogne ORLEANS (Loiret)

HISPANIO

Por fari Esperantan Eksposicion kontraŭ fashismon k militon, sendu el tutmond materialon: afishojn, objektojn, poshtkartojn. k.t.p. al k-do Tudela.

Dire.: Esperanta Sekcio el A. E. P. Carmen, 30 - Barcelono.

INDOĈINIO

K-do Novoko, 341, Frère Louis SAIGON - Indoĉinio, dez. koresp. per leteroj, poshtkartoj kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj, intershanghas ilustritajn kartojn, poshtmarkojn k fotojn kontraŭ esperantajhoj, franclingvaj indoĉinaj proletgazetoj, poshtkartoj.

SOVETIO

Studento de konstrua instituto en Poltava, deziras korespondi. USSR-Poltava-str. Korolenko, 2 Raboĉij, 29, 2 - Al K-do J. D. Dudniĉenko

Gelernantoj de unua modela mezlernejo volas korespondi pri ĉiuj temoj, intershanghi fotojn, jhurnalojn, afishojn. Nia adreso: USSR - Leningrado 46 - Str. Mira 14 - 1.ª shkola - Esp-o grupo.

Ni estas junaj esperantistoj lernantoj k deziras organizi internacian korespondadon kun vi k kun gejunuloj el via urbo. Ni povas al vi sendi leterojn, ilustr. pk., gazetojn. Demandu nin pri kio vin interesas. Respondo garantiata. Adreso: USSR - Harkov - ul. K. Liekneht, 40 shkola 62 - al K-do SINTJAKOVA.

G. A. S. - Aribau, 223